Ora Ĵurnalo

Numero 99, Oktobro 2026

Streĉaj aferoj okazas en kaj ĉirkaŭ "Kajskjul 8".
Det händer spännande saker i och omkring "Kajskjul 8".

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo....2

Pri Ora Ĵurnalo....2

Espeporko meditas....3

Ĉu vi volus aŭskulti ĵazon?, *Josef Kříž*....3

Kajskjul 8 por kulturo en Gotenburgo....4

Kajskjul 8 för kultur i Göteborg....4

En Gotenburgo la sveda televido filmis epizodon de Heredanto nekonata....5

SVT har i Göteborg spelat in ett avsnitt av Arvinge okänd....5

Limerickar skrivna av Roger Nilsson, Göteborg....8

Kiel mi perdis mian feliĉon, *Oldřich Arnošt Fischer*....9

Kial Artefarita Inteligento halucinas foje?, *Walter Klag*....11

”Kontraŭ la fluo”....12

Internacia Esperanto-Instituto: Pri diskuteblaj vortoj....12

Pri la samea popolo, parto 2, *Monica Eissing*....13

Om samer, del 2, *Monica Eissing*....13

Humuro el ”Veckan” 1904....18

La vojaĝo al la monda packonferenco en Moskvo somere 1962, *Soile Lingman*....19

Resan till världsfredskonferensen i Moskva sommaren 1962, *Soile Lingman*....19

Stefan Ljungquist – mirinda kantisto kaj aktoro....20

Stefan Ljungquist – en fantastisk sångare och skådespelare....20

Nova freŝa vento blovas super kastelo Greziljono....22

Servas invitas al membreco....23

Servas inbjuder till medlemskap....23

ÖPPET SEMINARIUM: Svenskans roll i den högre utbildningen – nu och i framtiden....24

Kiu estas la vorto?....24

Nia klubano **Paul de Beurs** partoprenis en la televida programo *På spåret* (Sur la trako) 2 oktobro legante tekston en esperanto.

Vår klubbmedlem Paul de Beurs deltog i På spåret 2 oktober där han läste en text på esperanto.

www.svtplay.se/video/8orrXaN/pa-sparet/avsnitt-3 42:19–46:00

(El eksterlando oni devas uzi VPN uzante la ligilon.)

Bild från SVT

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo.
Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@icloud.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com. Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.
Ora Ĵurnalo n-ro 99 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe www.esperanto-gbg.org/99

Solvo de la diventasko en p. 24: 1. aboni, 2. babili, 3. citi, 4. ĉeno, 5. draŝi, 6. eĥo, 7. fumo, 8. gluo, 9. ĝirafo, 10. hejmo.

Espeporko meditas

pexels.com

- La Libro- kaj Biblioteko-foiro en Gotenburgo ĵus okazis sen ĉeesto de la Esperanto-Societo de Gotenburgo – kaj SEF. La Esperanto-biblioteko en Stannum nun estas malestablita – sed havos novan vivon en Malmö.

  Ankaŭ la Internacia librorondo estas for.

  Kiu nova aktiveco do venos? Ni ne scias, sed foje oni devas forigi ion por havi lokon por novaj agadoj. Ni esperu!

- La ĝenerala elekto en Svedio ankoraŭ ne donis al ni novan registaron. La ukrainoj ankoraŭ suferas pro la milito kaj la civitanoj de Rusio pli kaj pli sentas la rezulton de la daŭrigo de la milito. Ĉie oni parolas pri paco. En la sesdekaj jaroj **Soile Lingman** vizitis packonferencon en Sovetio. Legu pri ŝiaj spertoj tiam!

- AI – Artefarita Inteligento – donas al ni helpon, malhelpon kaj foje ĝojon. Oni bezonas kaj scion kaj komunan saĝon por renkonti la nunajn defiojn. Oni notas, ke junuloj pli kaj pli ofte iras al kinejoj por ĝui pli prognozeblan mondon. Kaj en ĉi tiu numero la kantisto, aktoro k. t. p. Stefan Ljungqvist disradias sekurecon.

- Nun kaj la eklezio kaj la registaro petis pardonon al la sameoj pro mistraktado de ili dum jaroj. La artikolo pri sameoj daŭriĝas en tiu ĉi numero. La sameoj estas la sola indiĝena popolo en Eŭropo.

- Limerikoj estas por samlandanoj, ĉu ne? Malfacile tradukeblaj! Sed por svedoj la limerikoj de Roger Nilsson estas tre amuzaj.

- Ĉu esperanto kaj esperantistoj estas **Kontraŭ la fluo?** Meditu iomete pri la bildo kun tiu nomo!

- La novembra numero de Ora Ĵurnalo estos la 100-a. Kiel ni celebru tion?

  demandas al vi

  Siv

Ĉu vi volus aŭskulti ĵazon?

Josef Kříž *panglotia@gmail.com* sendis ligilon:

https://www.youtube.com/watch?v=sFsRYLGreOY

Kajskjul 8 por kulturo en Gotenburgo – Kajskjul 8 för kultur i Göteborg

de Ingegerd Granat

”Kajskjul 8” (Kaja budo 8) troviĝas en konstruaĵo situanta proksime al la Gotenburga Operejo kaj la bela haveno ĉirkaŭ la magazena kajo. La domo havas longan historion, kiu datiĝas de 1885 kaj tiutempe la domo estis uzata por transŝarĝado de importaj kaj eksportaj varoj al la haveno.

En la 1990-aj jaroj, la domo fariĝis io alia, loko por amuziĝo, prezentadoj kaj bona manĝaĵo. Do oni certe povus diri, ke la domo fariĝis grandskala spektakla restoracio, vera areno en historia loko por la gotenburga amuziĝo.

Bonvolu viziti kiam io okazas tie! Tie ofte ludis **Stefan Ljungkvist,** legu pri li en paĝo 20.

Kajskjul 8 finns i en byggnad som ligger nära Göteborgsoperan och den fina hamnen omkring packhuskajen. Huset har en lång historia sedan 1885 och på den tiden användes skjulet för omlastning av import- och exportvaror till hamnen.

På 1990-talet blev huset något annat, en plats för nöjen uppträdanden och god mat. Så visst kan man säga att skjulet har blivit en showrestaurang med stora mått mätt, en riktig arena i en historisk miljö för Göteborgsunderhållningen.

Ta gärna vägarna förbi när det är något på gång! **Stefan Ljungkvist** spelade ofta där, läs om honom på s. 20.

En Gotenburgo la sveda televido filmis epizodon de *Heredanto nekonata*

SVT har i Göteborg spelat in ett avsnitt av *Arvinge okänd*

Teksto kaj bildoj: Siv Burell

La prezentistino Kattis Ahlström kaj la filmisto Dan Nordgren.
Programledaren Kattis Ahlström och filmaren Dan Nordgren.

Marta Strandkulle ne havas konatajn heredantojn, tial SVT serĉas homojn, kiuj konis ŝin. Ĉar Marta flue parolis Esperanton, oni kontaktis Esperanto-organizaĵojn – kaj je nacia kaj je loka niveloj en Svedio. Montriĝis, ke **Ann-Louise Åkerlund,** la membro-sekretario de la Sveda Esperanto-Federacio, estis kunstudanto de Marta dum la Esperanto-kurso ĉe la Popola Altlernejo de Karlskoga en 1998. La kurson iniciatis kaj gvidis Lars Forsman. Bedaŭrinde li forpasis antaŭ kelkaj

Ann-Louise Åkerlund kaj Paul de Beurs.

Marta Strandkulle har inga kända arvingar, så SVT söker personer, som har känt Marta. Eftersom Marta behärskade esperanto, vände man sig till esperantoorganisationer – centralt och lokalt i Sverige. Det visade sig att **Ann-Louise Åkerlund,** medlemsansvarig för Sveriges Esperantoförbund hade varit kurskamrat med Marta på esperantoterminen på Karlskoga folkhögskola 1998. Initiativtagaren och ledaren för Esperantoterminen var Lars Forsman. Tyvärr avled han för några år sedan, annars hade han kanske också kunnat ge ledtrådar i sökandet efter Martas ev. arvingar. Under de 15 år Lars, före sin pensionering, hade esperantoundervisning i Karlskoga för svenska och utländska elever, blev han ett känt namn i esperantokretsar.

Då SVT bestämt sig för att intervjua Ann-Louise i Göteborg, föll valet på Trädgårdsföreningen. En esperantolektion skulle inrama intervjun.

jaroj; alie, li eble estus povinta doni indikojn por la serĉado de eventualaj heredantoj. Dum la 15 jaroj antaŭ sia emeritiĝo Lars fariĝis konata figuro en Esperanto-rondoj.

Kiam SVT decidis intervjui Ann-Louise en Gotenburgo, oni elektis la parkon Trädgårdsföreningen kiel lokon. Esperanto-leciono devis servi kiel fono por la intervjuo.

Paul de Beurs – origine el Nederlando – gvidas la sabatajn kursojn, kaj por tiu ĉi okazo li interŝanĝis la klasĉambron de Redbergskolan al la kafejo Rosenkaféet ene en la parko. La plano origine estis renkontiĝi ekstere, sed pluvo devigis ŝanĝon de planoj. Kompreneble, estis aliaj gastoj en la kafejo, kaj oni informis ilin pri la projekto.

La programo komenciĝis per tio, ke **Christin Granat** ludis la Esperanto-himnon, kaj ni – proksimume dek esperantistoj – kantis la unuan strofon.

Ingegerd Granat, prezidanto de la Gotenburga Esperanto-Societo, bonvenigis ĉiujn, kaj poste Paul de Beurs komencis la tiutagan lecionon.

Lasse Granat legis eltiraĵojn el artikolo en la septembra numero de nia kultura revuo, Ora Ĵurnalo. Lia bonega basvoĉo plenigis la ĉambron. La artikolo temis pri la turego Karlatornet, la plej nova orientilo de Gotenburgo. Eva Lindehag, la aŭtoro de la artikolo, tiutage prizorgis hundon, do anstataŭe venis ŝia **fratino Åsa.** La fratinoj havis tre malsamajn spertojn vizitante la turon: Eva sentis teruron, dum Åsa estis ravita. Esti en la vitra skatolo – pli ol 200 metrojn super la grundo – ĉirkaŭita de vitra planko, vitraj muroj kaj vitra plafono, estis malagrabla sperto por Eva, sed pura ĝuo por Åsa.

Paul de Beurs – ursprungligen från Nederländerna – leder lördagskursen och nu fick han byta ut Redbergsskolans lokal mot Rosencaféet i Trädgårdsföreningen. Först var det tänkt att vi skulle vara utomhus, men regnet ändrade planerna. I cafésalen fanns förstås några andra gäster. De fick information om projektet.

Programmet inleddes med att **Christin Granat** spelade esperantohymnen och vi – ett 10-tal esperantister – sjöng den första versen.

Ordförande för Göteborgs Esperantoförening, **Ingegerd Granat** hälsade alla välkomna, varefter Paul de Beurs började dagens lektion.

Lasse Granat fick läsa delar av en artikel ur septembernumret av vår kultur-tidskrift Ora Ĵurnalo. Hans härliga basröst fyllde salen. Artikeln handlade om Karlatornet, Göteborgs nyaste landmärke. Eva Lindehag, som skrivit artikeln, var den här dagen hundvakt, så hennes **syster Åsa** kom istället. Systrarna upplevde besöket i tornet helt olika – Eva med skräck och Åsa med förtjusning. Att i glasboxen, mer än 200 m. över marken, vara omgiven av glasgolv, glasväggar och glastak utan att ha något att hålla sig i, var en obehaglig upplevelse för Eva, men en njutning för Åsa.

Kattis Ahlström, Ann-Louise Åkerlund, la programparta produktanto Sara Arén kaj fotisto/filmisto Dan Nordgren. *Kattis Ahlström, Ann-Louise Åkerlund, inslagsproducent Sara Arén och fotografen/filmaren Dan Nordgren.*

Kattis Ahlström, kiu intervjuis Ann-Louise, antaŭe lernis kelkajn esperantajn frazojn: Saluton! Kiel vi fartas? Ĉiam plaĉas al esperantistoj, kiam oni uzas la plej inteligentan lingvon de la mondo.

Post la intervjuo, Ann-Louise sidiĝis inter la lernantoj de Paul.

La leciono daŭris per tio, ke Paul parolis pri la Universala Kongreso (UK) de 2026 en Graz, Aŭstrio.

Tamen, tio ne estis tute la fino. Sten Svenonius venis por diskuti pri ebla venonta

Kattis Ahlström, som intervjuade Ann-Louise hade i förväg lärt sig ett par eperantomeningar: Saluton! Kiel vi fartas? Alltid populärt bland esperantister, när världens smartaste språk används.

Efter intervjun slog sig Ann-Louise ner bland Pauls elever.

I bild också Jan Bondesson.

Lektionen fortsatte med att Paul berättade om UK 2026 i Graz, Österrike.

Riktigt slut var det ändå inte. Sten Svenonius kom för att diskutera en ev, kommande

semajnfina kurso en Malmö. La biblioteko de Malmö nun transprenis la Esperanto-bibliotekon de Gotenburgo en Stannum. Oni planas ankaŭ literaturan seminarion, kiu okazos paralele al la kurso en Malmö malfrue majo, kaj komenculan kurson.

Hundoj ne estas permesataj en Rosencaféet, sed oni trovas paserojn kaj interne kaj ekstere de la kafejo. Afiŝoj konsilas al gastoj atenti pri sia manĝaĵo. Dum mi koncentriĝas pri trovado de telefonnumero, Ingegerd kaptas la okazon por foti.

Ankoraŭ ne estas konate, kiam ĉi tiu epizodo de Arvinge okänd estos elsendata en televido. Kompreneble, ni esperas, ke oni trovos heredantojn. La fakto, ke Marta Strandkulle parolis Esperanton, estas kompreneble aparte ĝojiga. Por ni gravas vidi Esperanton prezentatan en televido! Eble nova Esperanto-printempo estas ĉe la horizonto – esperas,

Siv Burell – kaj certe multaj aliaj.

kurshelg i Malmö. Malmö bibliotek har numera tagit över Göteborgs esperantobibliotek i Stannum. Man planerar ett litteratur-seminarium parallellt med Malmökursen i slutet av maj och en nybörjarkurs.

Hundar är inte välkomna på Rosencaféet, men gråsparvar finns både i och utanför caféet. Skyltar råder gästerna att bevaka sin mat. Medan jag koncentrerar mig på att hitta ett telefonnummer, passar Ingegerd på att ta en bild.

När det här avsnittet av Arvinge okänd sänds i TV vet man i nuläget inte. Vår förhoppning är förstås, att man ska lyckas hitta arvingar. Att Marta Strandkulle talade esperanto, är förstås extra roligt. Att språket esperanto förekommer i TV är viktigt för oss! Kanske nalkas en ny esperantovår – hoppas

Siv Burell – och säkert många fler.

Limerickar skrivna av Roger Nilsson, Göteborg

Kalle som bodde i **Skår**
Skulle fyllt 75 detta år
Men se, åren försvann
Sådant händer iblann'
Och av Kalle finns nu ens ett spår.

En gammal gubbe från **Lunden**
Skulle sätta på koppel på hunden
Men man märkte rätt snart
Att när allting var klart
Var det gubben som själv blivit bunden.

En gränskontrollant i **Debrecen**
var så flitig att han blivit känd sen
den gång Ungern blev svart
för han orsaka' att
ens fotonerna slapp över gränsen.

En same vid namn **Pelle Sköld**
Skulle tävla i bistraste köld
vann en tävling på is
och tänk vilket pris!
Vad han vann, det var Norrlands Guld!

Per-Erik, helt lugn utan **stress**
va' en jävel att skriva på vers
Det hände en da'
"Vem e du", någon sa
"Jag är Per, men jag kallas Pervers."

En kille i **gjutarebranschen**
tappa' en dag helt balansen.
När han kokillen vält
blev han själv däri smält.
Han fick jobb som staty uppå Skansen.

En man på en marknad i **Kinna**
Bytte grejer med Marks härskarinna
Och när allting var bytt
och allt gammalt blitt nytt
var det hon som var man, han var kvinna.

Presidenten vid namn **Donald Trump**
Mot klimatet på jorden för kamp
När han talar om kol
Blir det mer än jag tål
Då knyter sig magen av kramp.

Vad är bäst?

1. En ren attack.
2. En renattack.
3. En renat, tack.

Kiel mi perdis mian feliĉon

Jindriška Drahotov, Ĉeĥio, sendis la jenan artikolon pri AI.

Verkis: **Oldřich Arnošt Fischer**
15-a Bjelisto kaj kajeroj
"Esperanto ligas homojn". Perditaj en la reto 2026.

Kiam en la mondo aperis interreto, mi miris: "Interreto? Kio estas tio? Ĉu tio estas iu kabareto? Ja mi scias diferencon inter tabureto kaj minareto, sed la vorton interreto mi neniam aŭdis". Eĉ kiam oni al mi priskribis historion kaj avantaĝojn de la interreto, mi longtempe obstine rezistis. Sed poste mi danke al la interreto trovis la unuan utilan informon kaj ekkomprenis, kiel multe da avantaĝoj al mi la interreto povas doni. Mia horizonto plilarĝiĝis!

Sed, sincere dirite, mi estas strangulo, kiu volas esti feliĉa, sed estas atentema. Kiel multe da proponoj de feliĉo mi sur la interreto trovis kaj tuj poste perdis! Ekzemple politikistoj de unu el niaj politikaj partioj al mi rete promesis preskaŭ surteran paradizon, se mi donos al ili mian voĉon. Ili havas grandajn ambiciojn, spertajn ekspertojn, precipe ekonomojn, kaj jam bonege scias, kiel gvidi nian popolon al eterna bonstato. Certe ili faros grandajn

pexels.com

ekonomiajn reformojn, danke al kiuj mi pagos malgrandajn impostojn. Mia emerita pensio ekkreskos. Dankon, sed ili ne skribis, kiel pro tiuj ŝanĝoj trovos monon. Pro tio mi balotis por alia partio kaj ĝis nun ne estas riĉulo. Tiel mia feliĉo perdiĝis. Multe da feliĉo promesas reklamoj pri alkoholaĵoj. Vane, ĉar mi estas abstinento. Dum mia vivo mi ŝparis iun monon, ne multe, sed mi estas kontenta kun tio, kion mi havas.

Kiel naiva mi estas! La interreto, fonto de la feliĉo, min informas, ke mi povas esti pli riĉa, eĉ fariĝi milionulo, se mi mian monon bone investos. Plej bone estos investi mian monon en la kompanion Honesta kaj Pli Honesta. Kruda petrolo, ebona ligno, diamantoj ktp. Mia mono ne kuŝu neutile en banko, sed kreu por mi pli multe da mono! Bone, sed sur reto mi ankaŭ trovis informon pri juĝo kontraŭ ĉefo de menciita kompanio, kiu jam kelkajn monatojn pro fraŭdo spiras kvadratetan aeron kaj ĉiutage diligente fabrikas paperajn saketojn! Pro tio mi ĝis nun mian ŝparitan monon ne investis kaj neglektis mian feliĉon.

Surprizo! Bonaj homoj ankoraŭ ekzistas! Nekonataj amikoj el vilaĝo Paviana Vadejo, kiu situas en afrika ŝtato Rumbumburo al mi sendas urĝan retmesaĝon. Kio okazis? Nekredeble! Iu riĉa germana ĉasisto, kiu havis la saman familian nomon kiel mi, en afrika ĝangalo dum ĉasado de hipopotamoj tragike dronis. Lia boato hazarde renversiĝis … Oni trovis lian korpon nur kiam la rivero elsekiĝis… Kompatinda sinjoro Fischer havis neniujn heredantojn. Miaj amikoj scias pri milionoj da eŭroj kaj iom da oro, sed malbonŝance ili mem ne kapablas la monon preni el banko. Ĉu tio ne estas peĉo? En tiu mizera situacio ili ĝustatempe rememoris pri mi, kiu loĝas en Eŭropa urbo Brno kaj certe al ili helpos. Kompreneble, ke kiam ili kun mia financa subteno la monon kaj oron akiros, ili juste kun mi dividos. Por necesa traktado kun la banko kaj doganistoj ili bezonos nur du milojn da eŭroj, kiujn mi sendos al banka konto … Precipe mi devas agi rapide kaj diri pri tio al neniu. Mi ilin obeis kaj vere agis rapide, tio signifas, ke mi tuj retletere direktis ilian konduton en limojn normajn kaj konformajn. Kial mi perdis mian feliĉon? Se mi ne estus atentema, mi povus esti milionulo. Aŭ almozulo.

Mia vivo estas eventoriĉa.

Venontfoje min feliĉigis foto de belega fraŭlino en kamufla uniformo. Ŝi estas usona soldatino kaj serĉas amikon. Do, mi estas feliĉe edziĝinta, sed se vere temus pri amika rilato … kial ne amikiĝi? Mi ĝentile al ŝi respondis, ke ŝi estas en aĝo de mia nepino, sed se ni havos la samajn aŭ similajn interesojn, ni povos esti interretaj amikoj… Feliĉo al mi ekridetis! Jam post tri horoj mi retletere ricevis pluan informon. La fraŭlino estas usona subleŭtenantino. Ŝi jam tri monatojn servas en armea misio en Respubliko Kamelujo, interesiĝas pri trikado, pentrado, kuirado, astronomio kaj pafado, kaj ŝia komandanto estas kolonelo Charles Smith.

Kion mi faris? Mi petis ŝin transdoni al la kolonelo mian sinceran saluton – kaj finis kun ŝi ĉiujn kontaktojn. Kial? Ŝi vere estis bela, sed antaŭ multe da jaroj mi servis en armeo, pro tio mi bone scias, ke vera soldato aŭ soldatino devas neniam al iu diri nomon de sia komandanto. Ne, verŝajne tiu fraŭlino pozis al fotisto en ies uniformo, sed ne estas soldatino. Denove mi perdis mian feliĉon! Sed pensante pri ĉiuj miaj interretaj aventuroj mi demandas, ĉu sur la reto mi vere perdis mian feliĉon? Ne, mi estas nature feliĉa homo kaj ĝuas la vivon. Sur la reto ĉiuj bonkoruloj senĉese volas mian feliĉon.

Mi ĝin donos al neniu!

Bona humoro ne solvas ĉiujn problemojn, sed kolerigos tiom da homoj, ke estas bone ĝin teni.

Kial Artefarita Inteligento halucinas foje?

Walter Klag, Aŭstrio havas demandojn al AI.

Respondo de AI:

Artefarita Inteligento (AI) – specife grandaj lingvomodeloj kiel ChatGPT – ”halucinas” (t. e. memfide elpensas falsajn informojn), ĉar ĝi ne funkcias kiel homa cerbo aŭ serĉilo, sed kiel tre evoluinta tekst-antaŭdirilo.

Jen la ĉefaj teknikaj kialoj, kial AI foje kreas falsajn faktojn:

1. Statistika antaŭdiro, ne kompreno

AI ne ”scias” kio estas la vero. Kiam vi faras demandon, la modelo kalkulas, kiu vorto plej verŝajne devus sekvi la antaŭan vorton, bazite sur miliardoj da tekstoj, kiujn ĝi legis dum sia trejnado. Se la plej ”verŝajna” sekva vorto science aŭ historie estas malmola eraro, la AI tamen skribos ĝin, ĉar la statistiko tiel sugestis.

2. Mankoj kaj eraroj en la trejnaj datumoj

AI lernas de la interreto. Se la trejnaj datumoj enhavas falsajn novaĵojn, mitojn, biasojn aŭ kontraŭdirajn informojn, la AI lernos tiujn erarojn. Krome, se pri iu tre specifa aŭ malofta temo ekzistas tre malmulte da tekstoj en la interreto, la AI ”plenigas la truojn” per divenoj.

3. ”Plezurigi” la uzanton (subfona dezajno)

Lingvomodeloj estas trejnitaj por esti helpemaj kaj doni fluajn, kompletajn respondojn. AI malamas diri ”Mi ne scias”. Kiam ĝi trovas sin en situacio, kie mankas al ĝi precizaj datumoj, ĝia interna algoritmo preferas krei kreivan (sed malveran) respondon ol lasi la uzanton sen respondo.



pixabay.com

4. Mankas ligo al la reala mondo

Por AI, vortoj estas nur matematikaj kodoj (vektoroj). AI ĝi mankas komuna prudento kaj fizika sperto. Ĝi ne povas rigardi tra la fenestro aŭ kontroli sian propran logikon per realmonda sperto. Pro tio, ĝi povas generi tekston, kiu gramatike kaj stile estas perfekta, sed logike tute absurda.

Kiel eviti ke AI trompu vin?

- Kontrolu gravajn faktojn: Neniam blinde fidu AI pri juraj, medicinaj aŭ gravaj historiaj detaloj.
- Petu fontojn: Vi povas peti la AI indiki fontojn aŭ uzi modelon, kiu havas rektan aliron al la interreto por serĉi aktualaĵojn.
- Donu klaran kuntekston: Ju pli preciza estas via demando, des malpli da spaco restas por ke la AI mem elpensu detalojn.

Ĉu vi volas, ke ni rigardu specifan ekzemplon de AI-halucino, aŭ ĉu vi interesiĝas pri kiel inĝenieroj nuntempe provas solvi ĉi tiun problemon (ekz. per RAG aŭ plibonigita trejnado)?

Respondoj de AI povas enhavi erarojn.

”Kontraŭ la fluo”

De Esperanto – al Esperanto…… La bildo venis al mia digitala leterkesto.

Bela, ĉu ne? Kio estas pli detale la mesaĝo de la bildo, laŭ vi?

Proponoj estas bonvenaj! Ĉu vi volus skribi tekston al la bildo por la novembra numero? Ni bonvenigas multajn tekstojn!

/Siv

Internacia Esperanto-Instituto: Pri diskuteblaj vortoj

”Ni kune faru la mondon pli verda.” ❤
’’Ne vortoj, sed agoj.’’

Internacia #Esperanto-Penso



La rakonto pri **”Pipi Ŝtrumpolonga”** estas konata al multaj generacioj. Multaj legis mem la libron pri Pipi, al multaj laŭtlegis ĝin gepatroj aŭ geavoj. Ĝi estas libro de infaneco de multaj el ni.

Antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis debato pri ŝangi vortojn kaj esprimojn en novaj eldonoj. La debato pri Pipi Ŝtrumpolonga estas bona ekzemplo de la konflikto inter malnova literatura verko, historia kunteksto kaj nuntempaj lingvaj normoj.

En la originalaj libroj de Astrid Lindgren, la patro de Pipi, Efraim Ŝtrumpolonga, estas kapitano kaj poste fariĝas negroreĝo. En kelkaj novaj eldonoj li estas nomata la reĝo de insulo en la Suda Maro.

La problemo estas, ke la vorto ”negro”, kvankam ĝi iam estis uzata pli ordinare en la

sveda lingvo, hodiaŭ estas konsiderata ofenda kaj malestimiga nomo por homoj kun nigra haŭto. Krome, la bildo de eŭropa blankulo kiel ”reĝo” super la indiĝena loĝantaro povas aspekti kiel produkto de la tiama kolonia mondpercepto.

Tial kelkaj eldonistoj kaj gepatroj demandis: ĉu infanoj ankoraŭ devas legi tiun tekston sen ŝanĝoj?

Miaopinie, se oni provas retuŝi aŭ reverki klasikan verkon, por ke ĝi konformiĝu al la hodiaŭaj valoroj, oni riskas forgesi ke la originala teksto ankaŭ estas historia dokumento. Ĝi montras, kiel homoj iam pensis kaj parolis.

Pipi mem estas eksterordinare kontraŭa al aŭtoritatoj, konvencioj kaj ”tiel devas esti”. Ŝi ne akceptas la kutimajn regulojn nur ĉar plenkreskuloj diras, ke ili estas ĝustaj.

Pro tio estas iom ironie, se oni uzas ŝian libron por instrui, ke ĉiuj malnovaj tekstoj devas esti konformigitaj al la nuna pensado. Pli interesa pedagogia vojo estus demandi infanojn:

”Kial oni uzis tiun vorton tiam, kial ĝi ĝenas homojn hodiaŭ, kaj ĉu ni opinias, ke aŭtoro de malnova libro devas ŝanĝi sian tekston?”

Tiel oni ne nur forigas la problemon – oni lernas pensi pri ĝi.

Kaj tio, laŭ mi, estas multe pli interesa ol simple reskribi la historion por ke ĝi aspektu kvazaŭ la problemo neniam ekzistis.

/Siv

Pri la samea popolo – Om samer

De **Monica Eissing** – Parto 2

La historio de la sameoj

La glaciepoko finiĝis antaŭ 10 000 jaroj. Tiutempe homoj alvenis en Skandinavion el du diversaj direktoj. Unu grupo de ĉasistoj-kolektistoj setlis en la sudaj regionoj, dum la alia alvenis en la nordon. Arkeologoj malkovris artefaktojn indikantajn, ke homoj vivis per ĉasado kaj fiŝkaptado en Sápmi antaŭ 10 000 jaroj. Sameaj artefaktoj datantaj de antaŭ mil jaroj estis trovitaj ĉe Vivallen en Härjedalen. Oni ankaŭ malkovris restaĵojn de la tradicia samea loĝejo kåta kaj objektojn montrantajn, ke la sameoj komercis kun aliaj popoloj.

Komence la sameoj ĉasis sovaĝajn boacojn, sed poste ili komencis malsovaĝigi ilin. Neniu scias precize, kiam tio okazis, kvankam malsovaĝigitaj boacoj jam ekzistis antaŭ mil jaroj.

Unu metodo por kapti sovaĝajn boacojn implikis la uzon de malsovaĝa ina boaco (vaja).

Samernas historia

För 10 000 år sedan tog istiden slut. Då kom det människor till Skandinavien från två olika håll. En grupp av samlare och jägare började leva i de södra delarna och den andra gruppen kom till den norra delen. Arkeologer har hittat föremål som visar att det fanns människor som levde på jakt och fiske i Sápmi för 10 000 år sedan. Arkeologer har funnit samiska föremål som är tusen år gamla i Vivallen i Härjedalen. Man har hittat rester av kåtor och föremål som visar att samerna handlade med andra folk.

pixabay.com

Ŝi allogis sovaĝajn virboacojn (sarv), ebligante ilian kapton dum ili proksimiĝis.

Laŭ fontoj el la 16-a jarcento, familio povis posedi inter dek kaj dudek boacojn. Oni melkis ilin kaj uzis ilin kiel ŝarĝ- kaj tirbestojn.

La reĝo postulas imposton

En 1533, la sveda reĝo Gustavo Vasa dekretis, ke la sameoj pagu impostojn al Svedio. Tamen, oni ne rajtis malbone trakti ilin, kaj ili konservis la rajton ĉasi kaj fiŝkapti sur siaj terenoj.

La vokto kolektis la imposton. Familio povis pagi 40 sciurfelojn jare. La vokto sendis ilin al Stokholmo, kie oni inspektis ilin kaj registris la detalojn pri la imposto. Dokumentoj el tiu tempo ankoraŭ ekzistas.

Pli altaj impostoj

En la 17-a jarcento, reĝo Karolo la 9-a altigis la impostojn por la sameoj. Ili devis transdoni parton de siaj boacoj. En sia kulmino, la reĝo posedis ĉirkaŭ 1 000 boacojn en Sápmi.

Tio malfaciligis la vivtenadon de la sameoj. Iuj translokiĝis suden, dum aliaj iris al Norvegio. La reĝo tiam konstatis, ke necesas denove malaltigi la imposton.

Vivmalfacilaĵoj devigis la sameojn ŝanĝi sian vivmanieron. Sovaĝaj bestoj iĝis pli malabundaj dum la samea loĝantaro kreskis; sekve, boacoj iĝis ĉiam pli gravaj. Ili akiris pli da malsovaĝigitaj boacoj kaj adoptis nomadan vivmanieron. Ili pasigis la plejparton de sia tempo en la arbaroj kaj foje en la pli malaltaj montarregionoj – kaj somere, proksime de la fjordoj – por ebligi al la boacoj paŝtiĝi.

Oni kreis foirejojn por ebligi al impostkolektistoj kolekti la impostojn. La plej fama el ili estas la Foiro de Jokkmokk. Foiro okazas tie ĉiun vintron ekde 1605, escepte de la tempo de la pandemio de COVID-19, kiam ĝi okazis ciferece.

La foiro funkcias kiel grava kunvenejo por sameoj el la tuta Sápmi.

Ifrån början jagade samerna vilda renar, men sedan började de tämja dem. Ingen vet när exakt det skedde. För tusen år sedan fanns det tama renar.

Ett sätt att fånga vilda renar var att ha en tam vaja. Den lockade till sig vilda sarvar på så sätt och när de kom närmare kunde man fånga dem.

Enligt källor från 1500-talet kunde en familj ha mellan tio och tjugo renar. De mjölkades och de användes som lastdjur och dragdjur.

Kungen kräver skatt

År 1533 bestämde svenska kungen Gustav Vasa att samerna skulle betala skatt till Sverige. Men de fick inte behandlas illa och hade rätt att jaga och fiska på sin mark.

Fogden samlade in skatten. En familj kunde betala 40 ekorrskinn per åt. Fogden skickade dessa till Stockholm. Där kontrollerades dem och allt om skatten antecknades. Det finns dokument kvar från den tiden.

Högre skatter

Kung Karl IX på 1600-talet höjde skatten för samerna. De skulle ge några av sin renar. Kungen hade som mest cirka 1 000 renar i Sápmi.

Det gjorde det svårare för samerna att klara sig. Några flyttade söderut och andra flyttade till Norge. Då förstod kungen att skatten måste bli lägre igen.

Det svåra livet gjorde att samerna fick leva på annat sätt. Det fanns färre vilda djur i naturen och samerna blev fler. Därför blev renarna viktigare. De skaffade fler tama renar och började leva som nomader. De var mest i skogarna och ibland på lågfjället, på somrarna vid fjordarna, för att renarna skulle kunna beta.

För att fogdarna skulle kunna samla in skatt skapades det marknadsplatser. Den mest kända är Jokkmokks marknad. Där har det varit marknad varje vinter sedan 1605 utom under koronapandemin. Då var den digital.

Svedio koloniigas Sápmi-on

